nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2012

## EN LA NACIA BIBLIOTEKO

La kolektiva vizito de esperantistoj al la Nacia Biblioteko, pri kiu ni informis en pasinta numero de "Nia Voĉo", okazis fine la 8-an de majo, vespere.

Respondeculo de la Biblioteko informis nin pri la historio, celo kaj strukturo de tiu institucio kaj la konstruaĵo. Ni havis la okazon viziti la bibliografian ekspozicion pri Esperanto, organizitan okaze de la 125-jariĝo de Esperanto, kaj okupantan la kvar vitroŝrankojn situantajn malantaŭ la halo de la Biblioteko. Poste, ni konatiĝis kun la ĉefa lego-salono, kaj ankaŭ aliajn ĉambrojn kaj arĥivejojn de la impona konstruaĵo.

Post la vizito, granda parto de la ĉeestintoj aliris proksiman drinkejon, por esperanta babilado, en kiu ankaŭ partoprenis nia aŭstralia samideano Daniel Kane.

## NENEŬTRALAJ AGADOJ

Dum la monato majo disvolviĝis en Madrido diversaj politikaj mobilizoj, kunmemorantaj interalie la okazintaĵojn de majo 2011, ĝenerale konataj kiel la movado 15-M aŭ la *indignuloj*, en kiuj partoprenis esperantistoj.

En la amase partoprenata manifestacio kiu kunmemoris tiun movadon, la 12-an de majo, kunmarŝis grupo da esperantistoj, akompanataj de esperanta flago, bone videbla.

La sekvan semajnfinon, SAT-en-Hispanio partoprenis en la Madrida Socia Forumo (MSF), renkonto por debato kiu okazis inter la 19a kaj 20a de majo 2012, en debato en kiu oni diskutis pri lingva demokratio kaj problemoj de komunikado.

## ESTONTO DE LA KURSOJ

Pedro Hernández sendis mesaĝon al la retaj forumoj, petante ideojn pri la daŭrigo de la ĉeestaj kursoj en la MEL-sidejo. Li pripensis ŝanĝi la tutan koncepton de la sistemo, kaj ŝatus havi aliajn vidpunktojn. Ĝis nun, oni organizis bazan kurson de oktobro ĝis januaro, kaj se estas homoj, ankaŭ ekde januaro. Kaj eventuale organizis ion por la homoj, kiuj volas perfektigi siajn kapablojn.

Ideo de Pedro por la venonta kurso estas organizi tutjaran ciklan kurson, tiel ke en oktobro komenciĝos la baza kurso, post la nova jaro ĝis Pasko la kurso daŭros, sed pli celata al la disvolviĝo de la komprenkapablo, lega kaj aŭda, uzante diversajn materialojn (radiolsendojn, surbendigitaj tekstoj, prelegoj, ktp), kaj la daŭrigo post la pasko estos celata ĉefe al la esprimkapablo (verkado, buŝa diskutado, bazaj prelegoj organizitaj de la lernantoj mem). Unu el la avantaĝoj de tio estas ke, ekzemple, homo kiu lernis interrete sed neniam parolis la lingvon, povos libere ekpartopreni post la Pasko por profundigi la parton, kiun oni bezonas. Estas proponata renkontiĝi ĉiumonate kun progresantoj en kafejo, antaŭ la *oficiala* babilado, sed ekde nun tio estos tute sendependa aranĝo, kaj malferma al ĉiuj homoj, kiuj bezonas ekparoli kaj volas esti kontrolataj de instruisto dume.

Opinioj, kritikoj kaj sugestoj bonvenataj.

Aliflanke, li baldaŭ anoncos la novan kurson en Madrido, interalie, en Facebook. Se vi havas konton en FB, vi povas amikiĝi al *"Cursos Esperanto en Madrid"* en la adreso http://www.facebook.com/cursosdeesperantoenmadrid kaj, se en via amikaro estas homoj, kiuj povas interesiĝi pri Esperanto (aŭ kiujn vi celas konvinki), proponu al ili *amikiĝi*. Ju pli da homoj, des pli da ŝancoj instrui al pli da homoj.

Por aliĝi kaj ricevi pliajn informojn: http://es.groups.yahoo.com/group/esperantovallekas/

## VIZITOS NIN

Fine de junio reprezentanto de UEA, Mélanie Maradan, partoprenos en la kunsidoj de la Teknika Komitato TC37 de la Internacia Organizaĵo de Normigado (ISO), kaj ties subkomitatoj okazontaj en Madrido, kiu disvolviĝos en Madrido dum la semajno de la 23a ĝis la 30a de junio.

Madridanoj certe havos okazon rendevui kun Mélanie unu aŭ plurajn fojojn. Ni konfirmos la kalendaron kiam alproksimiĝos la tagoj. Estas propono rendevui grupe dimanĉe la 24-an.

Por la ISO-kunsidoj ŝi mem reprezentos Esperanton, kaj ne eblas partopreno. Estas tamen unu teknika sesio de Infoterm (marde vespere, la 26-an de junio, je la 17:30-a horo, por ĉ. unu horo: http://www.infoterm.info) en kiu eblas partopreno de fakuloj/interesitoj. Jam estas iuj planoj, sed se iu el vi speciale interesiĝas, kontaktu nin, por kunordigi la aferon.

La 17-an de junio, dimanĉo, troviĝos en Madrido bulgara esperantistino Raia Androvska, kiu demandis ĉu eblas renkontiĝi kun hispanaj esperantistoj. Tuj kiam estos konfirmo, oni informos per la kutimaj forumoj.

## ALIAJ VENONTAJ RENKONTIĜOJ

La 9a Internaciisma Renkontiĝo okazos en Canet de Mar (Katalunio) de la 29a de junio ĝis la 1a de julio. Aliĝoj kaj informoj ĉe: http://www.esperanto.cat/ir2012/hejmo_eo.htm

La 9a Eŭropa Kongreso disvolviĝos en Irlando, de la 16a ĝis la 20a de julio, en urbo Galivo (Gaillimh/Galway). Ĝia temo estos "Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli", kiu celas konatigi la lernfaciligajn ecojn de Esperanto. Malfermos la kongreson la irlanda ministrino pri EU-aferoj, Lucinda Creighton, kaj la alta protektanto estas la prezidanto de Irlando, Michael D. Higgins. Por detaloj, rigardu www.europo.eu. Praktike: eblas flugi el multaj eŭropaj landoj al Dublino, kaj vojaĝi aŭtobuse rekte de la flughaveno al Galivo dum 2 horoj. Estos interesaj antaŭ- kaj postkongresoj, vidu http://eeu-kongreso.webnode.com/.

Ĉijare la IJK (Internacia Junulara Kongreso), http://ijk-68.hanojo.org/, okazos en la bela urbo Hanojo, ĉefurbo de la interesega lando Vjetnamio. Nia samgrupano Augusto Casquero, kiu nun troviĝas en tiu lando, sendis alvokon, klarigante ke la organizantoj ege entuziasme kaj diligente preparas ĝin, sed momente la aliĝo ne estas kontentiga, pro la lastminuta modifo de la sidejo. Ili meritas grandan sukceson. Bonvolu, laŭ viaj eblecoj, helpu ilin. Resendu ĉi tiun informon al ĉiuj (viaj konatuloj, lokaj kaj landaj asocioj, e-gazetaro kaj radio, ktp). Aŭ mem aliĝu!

La 9-an de junio oni organizas en provinco Gvadalaĥaro (Guadalajara) la tradician "Ruta de la jara" (*vojo de la cisto*), el Prádena de Atienza ĝis la Groto de la Urso (Cueva del Oso) ĉe la Alto Rey, ĉirkaŭ la rivero Pelagallinas. Temas pri 10 km da ne malfacila vojo, parte gvidata, kaj finiĝanta per tradicia muzika festo. Partoprenos kelkaj esperantistoj. Se vi interesiĝas, kontaktu kun Lupe pere de la forumo esperanto-madride.

La Kultura Semajno organizota de la *"Asociación de Vecinos del Barrio de Zofío"*, de la kvartalo Usera, pri kiu ni informis pasintnumere, prokrastiĝos ĝis post la somero. Plu daŭras la planoj munti ekspozicion de la paneloj pri Esperanto, kaj ankaŭ estas antaŭvidataj du prelegoj, unu pri nia lingvo, kaj alia kun rilato al ĝi. Ni informos kiam konkretiĝos la detaloj.

La kunvenoj de MEL okazas lunde je 18.30, en la sidejo de la grupo.

Novaĵoj kaj informoj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ aŭ en la forumo http://esperanto.creatuforo.com/

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com